La Internacia Naturprotektada Unio (IUCN) akceptas tion kiel pluan subtenon por la tezo, ke estas la homo mem kiu provokas la danĝeron pro ŝarkĉeesto - ĉu kiel unuopula senzorga konduto, ĉu pro organizita homa enmiksiĝo en la naturon.

"Ŝarkatakoj estas preskaŭ ĉiam homkaŭzitaj" legiĝas en *Shark Info*, la ĵurnalo de la organizaĵo kun rezidejo en *Gland*, Svislando. Al IUCN apartenas 61 membroŝtatoj.

Kiel eltrovis sciencistoj la risko jam en multobla maniero plialtiĝis pro la havenkonstruado. Antaŭ ĉio, la loko nuntempe allogas pli da ŝipoj. Kaj kiam pligrandiĝas la ŝipa trafiko, ĉiam ankaŭ plialtiĝas la ŝarkatakoj. La kaŭzo estas ne nur la maren-ĵetitaj kuirejaj defalaĵoj, sed ankaŭ la elektromagnet-kampoj kaj prem-ondoj de boatoj kaj iliaj maŝinoj. Tiaj vibradoj - samkiel ilin estigas ankaŭ predobestoj kaj ĉirkaŭplaŭdantaj homoj - estas la plej grava orientilo por ŝarkoj. Ili havas por tio specialan organon, nome la flanklinian sistemon, kiu ilin fidinde gvidas al predo, eĉ en plej malklara akvo. (Fonto: *dpa*)

Plua planedosistemo

Usonaj astronomoj malkovris pluan planedosistemon en la universa spaco, kiu same kiel la Tero kaj ĝiaj najbaraj planedoj rivoluas ĉirkaŭ unu stelo. La sistemo konsistas el minimume tri steloj, kiuj rotacias ĉirkaŭ la stelo *Upsilon Andromedae*, proksimume 44 lumjarojn for de la Tero, raportas la Usona Astronomia Asocio. Ĉiu el tiaj tri planedoj estas pli granda aŭ preskaŭ tiom granda kiel Jupitero, la 'giganto' en nia sunsistemo.
(Fonto: *Main Post* 1999-04-17, p. J12)

Amazona fonto difinita

Dum ekzpedicio de *National Geopgraphic Society*, teamo el kvin nacioj unuafoje ekzakte difinis la fonton de la rivero Amazono. Helpe de moderna navigacia teĥnologio la scinecistoj sukcesis, identigi riveron je pli ol 6000 m alta monto *"Nevado Mismi"* en suda Peruo kiel fonton. La ekzakta difino de la Amazona fonto estis ebla sole pro uzado de plej moderna nova satelitsistemo. (Fonto: *dpa*)

Ternuksoj ofte ŝarĝitaj

Laŭ ekzamenrezulto 1997 de nutraĵ-monitora grupo, ternuksoj ofte enhavas nedeziritan pezan metalon kadmion. La duono de ĉiuj specimenoj de rostitaj kaj salitaj ternuksoj transpasis la direktodonan limigon, ellaboritan por antaŭgarda konsumanta protektado. Oni plue ekzamenis la ternuksojn kontraŭ ŝimfunga veneno. La rezulto: en pli ol 80% de la eksperimentaj provoj la fungoveneno aflatoksino ne estis demonstrebla.
(Fonto: *Naturarzt* n-ro 7, 140a jarkolekto, julio 2000, p.46)

Nuksoj malplialtigas ĥolesterinon

Bonaj sciigoj por ĉiuj, kiuj ŝatas manĝi nuksojn, precipe juglandojn. Laŭ plej novaj ekkonoj malplialtigas la juglandoj la ĥolesterinan nivelon, eĉ pli ol la multe gloriita olivoleo. Tiu surpriza rezulto venas de hispanaj kuracistoj. En respektiva studo partoprenis viroj kaj virinoj kun plialtiĝintaj ĥolesterinaj kaj trigliceridaj niveloj.

La ekzamenitoj ricevis *aŭ* tipan mediteranean manĝaĵon kun olivoleo (sed sen nuksoj) *aŭ* striktan juglando-dieton. Ĉe tiu lasta, parto de la olivoleo kaj aliaj nesaturitaj grasaj acidoj estis anstataŭataj per 41 ĝis 56 gramoj da juglandoj (8 - 11 juglandoj/tage). La ekzamenrezulto: ĥolesterin- kaj triglicerid-proporcio malplialtiĝis ĉe la juglando-dieto pli signife ol ĉe mediteranea manĝaĵo. (Fonto: *Naturarzt* n-ro 11, 140-a jarkolekto, nov. 2000, paĝo 44)

Mediteranea nutraĵo kontraŭ artrozo

Esploristoj jam delonge provis eltrovi, ĉu la mediteranea manĝaĵo influas la reŭmatisman artrozon. Ŝajnas ke olivoleo kaj freŝaj legomoj protektas kontraŭ malsanoj de la artikoj kaj mildigas ties simptomoj. Grekaj sciencistoj de universitato Ateno nun malkovris, ke la evoluo de la malsano estas intime ligita kun la nutrado. Pacientoj el ekzamengrupo, kiuj uzis nur malmulte da olivoleo en la nutraĵpreparo montris 2½-oble pli altan riskon, malsaniĝi pro reŭmatisma artrozo. Tiuj, kiuj manĝis plej ofte legomojn, malplialtigis la malsanoriskon je 75 procentoj.
(Fonto: *Naturarzt* n-ro 7, 140a jarkolekto, julio 2000, p. 46)

Muzikpremio "Sciencaj Eldonoj"

La Mozartaj Skizoj

La eldono de la skizoj de *Wolfgang Amadeus MOZART*, prezentita de la muziksciencisto *Prof. Dr. Ulrich KONRAD* de la universitato *Würzburg* estis distingita en la kategorio "Sciencaj Eldonoj" per la Germana Muzikeldon-Premio de la jaro 1998. La eldonaĵo aperis en grandvolumena kasedo kaj entenas la multkolorajn faksimilojn de la entute cent postlasitaj skizofolioj de Mozarto de la jaroj 1769 ĝis 1791, la transskribon de la ofte nur malfacile deĉifreblaj notoj, kaj akompanan libreton kun kritika raporto kaj diversaj indeksoj.

Ek de la pasinta jaro, do, per tiu eldono estas havebla - por la unua fojo en la historio de la Mozartesplorado - la kompleta ĝis nun konata skizaro de la komponisto. La Germana Muzikeldonista Asocio, kiu disdonas tiun premion, aprezis - krom la elstaran publikigon - la por muzikscienco "novstilan kaj por la estonteco valorgradigan eldonaranĝon". Ĝi speciale distingiĝas pro tio, ke la genetikaj ŝtupoj de la manuskriptoj prezentiĝas plurkoloraj en la transskribadoj, kaj tiel komunikas analitikan aliron al la verkadmaniero de Mozarto.
(Fonto: *Main Post* n-ro 91, 1999-04-21, p.15)